Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

25-a Jarkolekto * Marto 2009 * N-ro 83

ISSN 1576-06



LUCENA

Ses-pinta stelo ornamas Andaluzion

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

COLABORADORES: Antonio Fabián JIMÉNEZ, Cristina PÉREZ BAEZA.

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio 3
13-a Andaluza Kongreso de Esperanto 7
Kiel nomi la esperanto-literojn? 13
La Maŭridaj Ludoj en Purĉeno 15
Universaligo de la Andaluza Lingvo-varianto 18
Ĝenerala Asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.....20
La Brajla Skribado kaj Legado en la Komputiloj 22
Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo 24
Paĝoj pri Nia Historio 25
Historia de los Movimientos Sociales:
Orígenes y Motor del Esperantismo.....27
Humoro 29
Turismi en LUCENA.....30
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio 34
Andaluza Esperantologia Semajnfino 35
Flamenko.....36

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

ESPERANTO EN ANDALUZIO

➢ GRANADO

La pasintan 13an de novembro 2008 okazis en la Kultura Centro "Francisco Suárez" en Granado, prelego pri lingvoj, kadre de la Internacia Jaro de la Lingvoj – 2008. Okazis prezento kaj posta debato inter parolantoj de la lingvoj angla, interlingua, esperanto kaj la latina. La prelegaron organizis S-ro Hermenegildo de la Campa, profesoro en la Fakultato de Teologio de la Universitato de Granado kaj ankaŭ instruanto de la internacia lingvo Interlingua en tiu Universitato.

Pri esperanto parolis la malagano Javier Martín, vicprezidanto de la Malaga Esperanto-Asocio "Marbordo de la Suno". Aliaj ĉeestantaj esperantistoj estis Jordi Lietor kaj Higinio Martínez, ambaŭ de la Jaena Esperanto-Asocio. Ĉeestis proksimume 40 personoj kiuj sekvis la prezentadon de la parolantoj de tiuj lingvoj kaj la posta, kvankam tro mallonga, debato.


La Universitato de Granado okazigas kurseton pri la internacia lingvo Interlingua, kun akademia valoro de 3 kreditoj. Do, estis utila ĉi tiu prezento por montri al ĉiuj en tiu Universitato, ke esperanto posedas sufiĉan valoron por enkadrigi ĝin ene de ontaj universitataj studoj.



S-ro Javier Martín prelegas pri esperanto en Granado. Novembro 2008

➢ PUNTA UMBRÍA (Onubo)

Organizita de Danica kaj Djordje Obradovic kaj kun la subteno de la Urbodomo, okazis de la 15-a ĝis la 22-a de decembro 2008 ekspozicio ĉe la Publika Biblioteko de la onuba vilaĝo Punta Umbría, sub la titolo: ***Lernu esperanton, ekkonu la mondon / Aprende esperanto, conoce el mundo.***



Djordje Obradovic organizas la ekspozicion

Loko ene de biblioteko estis konvena por montri al vizitantoj diversajn esperantaĵojn kiuj pruvas vivan kulturon kaj vastan uzadon de Esperanto kiel ponta lingvo, neŭtrala kaj ne-diskrimina.

Sed, krom la ideon la organizantoj havis preskaŭ nenion bezonatan por la ekspozicio. Per helpo de kelkaj geamikoj ili kune povis montri al la vizitantoj pli ol 180 ekzemplerojn pri Esperanto kaj en Esperanto.

Lernolibrojn, vortarojn, legolibrojn en esperanto kaj en la hispana lingvo pri esperanto, infanan esperantan literaturon, fakajn librojn kaj turismajn prospektojn. Kani Salguero, el Don Benito (Badajoz), Alejandro Pareja el Madrido, Josse (Mami Jo) el Montpeliero sendis al la organizantoj diversajn esperantajn gazetojn, turismajn prospektojn, propagandilojn kaj diversajn interesajn esperantaĵojn. El Malago Julio Herrero sendis pli ol 70 librojn pri esperanto kaj en esperanto, ĉefe konatajn hispanajn verkojn tradukitajn en esperanton. Kelkajn librojn kaj prospektojn sendis ankaŭ Vesna, filino el la geedzoj Obradovic, el Mariboro (Slovenio). Flagon, afiŝon kaj invitilon preparis Djordje Obradovic.

Inter la materialo oni povis trovi unuan lernolibron de L.L.Zamenhof, eldonita en 1887 en Moskvo, Sanktan Biblion, tradukita de Zamenhof, du interesajn librojn pri vojaĝoj de Tibor Sekelj, loteriajn biletojn de ONCE kun vizaĝo de Zamenhof, ktp. Ĉio tio devis pruvi vastan ĉeeston de esperanto en la socia vivo.

Apartan intereson vizitantoj montris al konata hispana literaturo tradukita en esperanton kaj eblo lerni esperanton per interreto. Kvankam komence estis interkonsento por dutaga ekspozicio kaj ankaŭ en afiŝoj estis menciitaj du tagoj, la ekspozicio daŭris dum la tuta semajno laŭ deziro de la Urbodomo de Punta Umbría kaj de la loka biblioteko.

Kiel kuriozaĵo oni devas diri, ke solena malfermo de la ekspozicio okazis la 15-an de decembro je la sama horo (17:30) kiel la inaŭguro en la sidejo de UNESKO en Parizo de samcela ekspozicio por festi la datrevenon de L.L. Zamenhof. La ekspozicion en Punta Umbría malfermis urba konsilantino pri kulturo kaj ĉeestis ĵurnalistoj kaj eĉ la loka televido. Do, la ekspozicio havis sufiĉan reeĥon en la loka kaj provinca gazetaro.



En la ekspozicio abundis originala kaj tradukita literaturo.

➢ ESTEPONA (Malago)

Okaze de specialaj aktoj dediĉitaj al la Tago de la Paco (30an de januaro), la Malaga Esperanto-Asocio "Marbordo de la Suno" okazigis kvar prelegojn dediĉitaj al la internacia lingvo ĉe la Gimnazio "Mar de Alborán" en Estepona (Malago).

La gelernantoj ricevis informojn kaj scivolaĵojn pri esperanto. Oni klarigis la nunan situacion de esperanto en la mondo kaj la kutime ne konatan ĉeeston de nia lingvo en Interreto, kino, literaturo... Oni ankaŭ penis detrui tiujn famajn kaj malverajn onidiraĵojn pri la lingvo kiuj diras,ke esperanto estas mortinta lingvo, ke ĝi esas malfacila, ktp.

Espereble la junaj geknaboj lernis ion pli pr la neŭtrala, facila, vivanta, internacia kaj bela lingvo esperanto.



Antonio Fabian parolas en la Gimnazio "Mar de Alborán" pri Esperanto.

➢ VIKIPEDIO (Interreto)

Tagon post tago aperas novaj vortoj rilataj al Andaluzio ĉe la esperanta versio de Vikipedio. Lastatempe aperis jenaj vortoj:

- **Martos**, vilaĝo de la provinco Jaeno.
- **Aben Humeja**, elstara maŭrido de la 16-a jarcento.
- **Abd-Allah Al-Bajjasi**, reĝo de la baeza tajfo dum la 13-a jarcento.
- **Triana,** andaluza rokenrola muzik-ensemblo.
- **Alameda**, andaluza muzik-ensemblo.
- **Medina Azahara**, kordova muzik-ensemblo.

Vikipedio estas interreta enciklopedio malfermita al ĉiuj legantoj kaj kunlaborantoj. Do, ne hezitu enirigi novajn vortojn en ĝi.

Vizitu: http://www.eo.wikipedia.org

13-a Andaluza Kongreso de Esperanto

Kordovo 7a-9a Novembro 2008

Komence de la jaro 2008-a la Estraro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo petis al José María Rodríguez la organizadon de la 13-a Andaluza Kongreso de Esperanto en la urbo Kordovo. Li tuj akceptis la proponon, ĉiam estas agrable organizi renkontiĝon de geamikoj kaj ankaŭ pro la fakto, ke ekde la jaro 1984 neniu oficiala esperantista kunveno okazis en Kordovo.

La kongreson oni pripensis ne kiel tute serioza kunveno, do plena je aktoj, ekspozicioj, ktp; sed male, kiel renkontiĝo kun du gravaj celoj: unue, utila por paroli kaj paroligi la internacian lingvon, ĉar ne abundas en Andaluzio la okazoj kiam esperanto povas esti parolata kaj aŭskultata; kaj due, por decidi la plenumendajn agadojn de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo por la venonta jaro. Ambaŭ aferojn oni atingis.

La Kongreso okazis de la 7-a ĝis la 9-a de novembro 2008. Dum tiu semajnfino trideko da geesperantistoj de Andaluzio, Madrido, Reĝurbo kaj eĉ eksterlandanoj venintaj de Francio, Germanio kaj Slovenio renkontiĝis ĉe la Junulara Restadejo de Kordovo. La unuaj gepartoprenantoj alvenis dum la vespero de la vendredo 7-a de novembro.

La Kongreso disponis je salono ĉe la Junulara Restadejo kaj la plejmulto el la gekongresanoj ankaŭ restis kaj manĝis ĉe tiu Restadejo, kie la organizanto trovis ĉiajn facilaĵojn por organizi la renkontiĝon, inter ili tre favora prezo.

La mateno de la sabato 8-a utilis por diskuti pri la nuntempa situacio de la internacia lingvo en Andaluzio. Oni debatis pri la organizataj kursoj, ĉefe en Sevilo, Jaeno kaj Malago; kaj pri la organizotaj, kun la revo enirigi la instruadon de la internacia lingvo kaj ĝia kulturo en la universitatojn. Konkrete en la Universitato de Malago, tiel Antonio Fabián Jiménez sciigis pri sia projekto proponi la instruadon de esperanto en tiu Universitato kun oficiala akademia valoro.

Oni parolis ankaŭ pri la venontjara eldonado de la esperanto-traduko de "Platero kaj Mi", ĉef-verkaĵo de la andaluza nobel-premiito Juan Ramón Jiménez. José María Rodríguez informis pri la laboro de la tradukanto Miguel Gutiérrez Adúriz kaj siafoje, Julio Herrero pri la rajtigo eldoni la tradukaĵon de la verko atingita de la familianoj de la aŭtoro antaŭ kelkaj jaroj.

La celo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas prezenti la libron okaze de la venonta Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta en Malago dum la somero de la jaro 2009. Ankaŭ oni parolis pri la demarŝoj faritaj de la Malaga Grupo rilate la organizadon de tiu kunveno.

Dum la vespero okazis la kulturaj prelegoj. Rikardo Fellipe Albert Reyna parolis pri la lingvo kaj literaturo en Al-Andalus. Verdire ĉiuj gepartoprenantoj profitis la profundajn konojn de Rikardo pri la lingvo parolataj dum la islama periodo en Andaluzio.



Gepartoprenantoj en la salono de la Junulara Restadejo

Se paroli pri la organizado de la Esperanto-Movado en Andaluzio, oni decidis daŭrigi la nuntempan strukturon kaj leĝan situacion de nia andaluza E-asocio, ne federacio, kies ĉefa celo estas kunordigi la laborojn de la jam ekzistantaj grupoj en la andaluzaj urboj kaj helpi la aperon de novaj grupoj en tiuj urboj kie esperanto ankoraŭ ne estas disvastigita lingvo.

Posttagmeze okazis la komuna manĝado, ĉi-foje iomete originala ĉar ĝi okazis meze de parko.

Ni ne forgesu, ke li estas profesoro pri la araba lingvo en madrida universitato.

Poste, Pedro Hernández parolis pri la sperto krei esperanto-lingvan familion. Gajaj estis la sciigoj pri la lerteco de la infanoj kiuj kapablas paroli en diversajn lingvoj ĉe sia familia vivo.

Fine, la slovanino Danica Obradovic parolis pri kiamaniere la andaluzoj estas vidataj de eksterlandano kaj kial ŝi kaj sia edzo



Komuna manĝado dum la unua tago de la Kongreso, meze de parko.

elektis nian landon por loĝi dum longaj periodoj de la jaro, elekto kiun ni ĉiuj dankas, kompreneble. Dum la vespero ankaŭ okazis gaja momento kiam Jordi Lietor de Jaen kaj Christine de Tuluzo (Francio) ludis kelkajn humorajn sketĉojn.

Kvankam la programero de la sabato finiĝis post la prelegoj, multaj gepartoprenantoj profitis la kordovan nokton por promenadi tra la historia kvartalo de Kordovo, deklarita de UNESKO kiel havaĵo de la Homaro. Tra la Moskea kvartalo kaj ĝiaj mallarĝaj stratoj la esperantistaro promenis kaj ĝuis la belecon de multaj stratanguloj.

Dimanĉe matene, la gepartoprenantoj vojaĝis per aŭtobuso en la kalifan urbon Madinat Al-Zahra, je 7 k-moj de Kordovo. Tie oni povis vidi la ruinojn de tiu araba urbo kiu, kvankam apenaŭ floris kiel kalifa urbo dum unu jarcento, en la historio de Al-Andalus ĉiam restis en la memoro kiel urbo montranta la povon kaj gloron de la islama kulturo en la sudo de la Ibera Duoninsullo. Dum la turisma vizito Jordi Lietor, profesia turism-gvidanto kaj Rikardo F. Albert, universitata profesoro pri araba lingvo, klarigis al la gepartoprenantoj multajn aferojn pri la ĉiutaga vivo de la tiamaj islamanoj.

La Kongreso finiĝis post ĉi turisma vizito. Verdire dum la 13-a Andaluza Kongreso de Esperanto oni ĝuis allogan okazon por praktiki la internacian lingvon ĉar esperanto estis uzata okaze de ĉiuj debatoj, prelegoj, diskutoj kaj ankaŭ dum la turisma vizito. La kongresejo, meze de la juda kvartalo tuj apud la Moskeo, estis je nia tuta dispono dum la sabato kaj tie oni povis trankvile vivigi nian lingvon.

Sukcesa estis ankaŭ la vendado de libroj, ĉar preskaŭ ĉiuj oferitaj en la Libro-Servo elvendiĝis. Do, agrabla kongreso kie sendube nia lingvo vivis ĉar oni uzis ĝin ĉiumomente.




Dum la vizito al Madinat Al-Zahra



Galerio pri fotografaĵoj de la Kongreso



Gepartoprenantoj antaŭ la komenco de la Kongreso.



Rikardo F. Albert Reyna parolas pri lingvo kaj literaturo en Al-Andalus.



Sylive kaj Jordi sketĉas.



ĉe unu el la plej belaj stratoj en Kordovo.



Nokte ĉe tipa teejo



Turisma Vizito al la ruinoj de Madinat Al-Zahra

Kiel nomi la esperanto-literojn?

Verŝajne, kiam komenciĝas kurso de la lingvo esperanto en la hispana, la instruanto ofte komencas ĝin pere de la klarigo de la liter-sonoj. La unuaj minutoj do, utilas por alkutimiĝi al la dirado kaj aŭskultado de jenaj sonoj ... *ŝ, ĝ, ĵ...* Tamen la profesoro kutime ne klarigas al la lernantaro kiel nomiĝas la literoj en esperanto.

En la hispana lingvo ni ĉiuj lernis la alfabeton en la lernejo ... *a, be, ce, de, e, efe...* Ĉu okazas same kiam oni eklernas la internacian lingvon? Eble jes, okazas tiam ke la memlernanto aŭ la instruisto lernas aŭ lernigas literojn kies sonoj estas malfacile distingeblaj en la alfabeto mem: ... *a, bo, co, ĉo, do, e, fo...* La finaĵo "o" sendube estas logika se ni formas sustantivojn el la literoj, tamen por lernigi, kaj ĉefe por scii pri kiu litero temas, tiu finaĵo povas esti ĥaosa.

La unua paragrafo de la Zamenhofa "Fundamenta Ekzercaro" estas la libro kiu unuafoje donis nomon al la esperanto-literoj. Laŭ tiu libro la alfabeto estas:

a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo.

Tio estas, ĉiuj konsonantoj finiĝas per "o". Do, por aldiri mallongigojn kie aperas konsonantoj, kiel *ktp* (kaj tiel plu), ni devus diri *"kotopo".* Same se oni devas legi la nomon de asocio mallongigite: Unuiĝintaj Nacioj = UN = *uno.*

Tamen, tiu nomigo ne montriĝas tre praktika kiam ni parolas pere de scienciaj vortoj. Ekz. se oni deziras diri la nomon de kelkaj ĥemiaj formuloj, kiel ezkemple tiu de la formaldehido, HCHO, ni devus legi: *hocohoo.* La legado de kompleta ĥemia formulado povus esti tute ne-komprenebla. Tiel, por eviti tiun konstantan ripetadon de la finaĵo "o" oni proponis novajn nomojn por la literoj.

Gaston Waringhien, la aŭtoro de "Plena Ilustrita Vortaro" proponis en la jaro 1951-a jenan alfabeton:

a, ba, co, ĉo, da, e, fo, ga, ĝa, ha, ĥo, i, jo, ĵa, ko, lo, mo, na, o, po, ra, so, ŝo, to, u, ŭo, va, za.

Siafoje D-ro Belinfante ankaŭen la jaro 1951-a proponis jenon:

a, be, ce, ĉe, de, e, ef, g, ĝo, haĉ, ĥa, i, jot, ĵe, ka, el, em, en, o, pe, er, es, ŝa, te, u, ŭe, vi, zet.

La prestiĝa verkisto K. Kalocsay proponis alian bazita sur internacia kutimo kiu atingas malaperigi la miskomprenon inter similsonaj konsonantoj:

a, be, ce, ĉa,de, e, ef, ge, ĝe, ha, ĥi, i, je, ĵi, ka, el, om, en, o, pa, er, es, eŝ, ta, u, ŭo, ve, ze.

Kiel asertis Kalocsay kaj Waringhien mem en "Plena Analiza Gramatiko", neniu sistemo estas plene kontentiga, la unua kaj la tria ekzemplo pro sia arbitreco, la dua ĉar ĝi ne atingas distingi proksimajn sonojn, kiel *em-en, de-te.*

Kaj kiamaniere nomi ne-esperantajn literojn sed ja sufiĉe internaciaj, kiel q, w, x kaj y? Nu, ekzistas diversaj formoj nomi ilin. Por la litero Q estas eble trovi *kuo, kvo* aŭ simple *ku.* Por la litero W oni uzas ĝenerale la nomon *ĝermana vo,* kvankam ankaŭ estas eble legi *duobla vo* kaj eĉ *ŭe.*

Por la litero X estas tute akceptita la nomo *ikso*, ekzemple en la vorto X-radioj = *ikso-radioj.* Tamen oni uzis iam la nomon *is.* Kaj fine por la litero Y ĝenerale oni uzas *ipsilono,* kvankam ankaŭ estas eble trovi *greka i* aŭ *uaj.*

Do, la afero nomi la esperanto-literojn restas solvota kaj ni ĉiuj rajtas akcepti unu aŭ aliajn proponojn.

Ĉu Vi jam (re)-aliĝis al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ?

Memoru, ke kiu ajn agado favore al la disvastigo de la internacia lingvo esperanto en Andaluzio ne sukcesos se oni ne kalkulas kun la kunlaboro kaj apogo de ĉiuj andaluzaj esperantistoj.

Do, kion Vi atendas por aliĝi aŭ re-aliĝi al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ?

Ĉu Vi konsideras, ke 20 euroj jare estas aliĝ-kotizo tro alta?

Ni kalkulas kun Vi !

La Maŭridaj Ludoj en Purĉeno

Aben Humeja estas la araba nomo sub kiu estas konata hispana maŭro, kies kristana nomo estis Fernando de Córdoba y Valor kaj kies vera nomo estis Muhammad ibn Umajja. Li naskiĝis en la jaro 1545 ĉe granada islama familio, laŭdire rektaj idoj de la kordovaj omejaj kalifoj kaj kiuj, devige, kristaniĝis post la konkero de Granado fare de la Katolikaj Gereĝoj, Izabela de Kastilio kaj Ferdinando de Aragono en la jaro 1492.

Pro la kunlaboremo kaj kristaniĝo de la familio la Gereĝoj mem donis al ili la Sinjor-landon de Valor, en tiu vilaĝo la familio sidejis kaj pro tio ili ankaŭ estis konatak kiel *Los Valoríes.* Fernando de Córdoba y Valor estis membro de la Urba Konsilantaro de Granado.

Kiam en la jaro 1568 la reĝo Filipo la 2-a, nepo de tiuj la reĝoj konkerintaj Granadon, malpermesis la uzon de la arabaj lingvo kaj kutimoj, respektataj post la konkero de Granado en la jaro 1492, la maŭridoj, islama enloĝantaro de Andaluzio, ribelis kontraŭ la kastilia reĝo ĉe la Alpuhara Montaro, sude de Andaluzio. Fernando de Córdoba



Ribelo de la Maŭridoj en la Alpuharoj
Granado 1568

y Valor aliĝis al la ribelo. Li forĵuris sian kristanan kredon kaj li adoptis novan nomon: Muhammad ibn Umajja. Dank'al la influo de sia familia li fariĝis la estro de la ribelado kaj oni proklamis lin reĝon. La ribelantoj luktis kontraŭ la kastiliaj trupoj komanditaj unue de la Markizo de Mondejar kaj poste de Juan de Aŭstrio, frato de la reĝo Filipo la 2-a.

Unuamomente la maŭridoj atingis gravajn venkojn, dank'al tiuj ili okupis la Almanzoran Valon kaj stariĝis en Purĉeno la ĉefurbo de la maŭrida reĝolando. Aben Umejja deziris revivigi la antikvajn tradiciojn de la islamanoj en la Ibera Duoninsulo, pro tio li, en la jaro 1589, decidis organizi sportajn kaj muzikajn aktojn kie partoprenus maŭridoj de Granado, Baza, Guadix kaj de la Alpuharaj vilaĝo. Ankaŭ ĉeestis islamaj soldatoj de la nordo de Afriko kaj eĉ de Turkio. La celo de tiuj ludoj estis ne nur rekuperi antikvajn islamajn tradiciojn sed ankaŭ levi la spiriton de la soldatoj.



Logotipo de la modernaj Maŭridaj Ludoj

La sportaj ludoj estis: luktado, ŝton-levigo, kurado, ŝton-ĵetado, saltado kaj arko-pafado. La historiisto Ginés Pérez de Hita en sia libro "*Guerras Civiles de Granada*" publikigita en la jaro 1616 sciigis pri la okazigo de tiuj ludoj.

En la jaro 1993 la Urbodomo de la vilaĝo Purĉeno decidis denove okazigi ĉi tiujn ludojn. Oni sekvis detale kaj fidele la rankontojn de la historiisto. Do, ekde tiu jaro okazas en la somero de ĉiu jaro la *Maŭridaj Ludoj*, apogitaj de la propra Internacia Olimpika Komitato, kies eks-prezidanto Juan Antonio Samaranch diris ke ... *la maŭridaj ludoj de Aben Umejja eble estas la perdita ĉenero inter la antikvaj grekaj Olimpikaj Ludoj kaj la modernaj olimpiadoj.*

Fine de la monato julio okazas ĉi-jare la 15-aj Maŭridaj Ludoj laŭ la jena programo:

Sportoj: lukto, ŝton-levigo, brik-sustenado, rapid-kurado, ŝton-ĵetado ka ark-pafado.
Kulturo: Dancado, Kantado.




PLATERO KAJ MI la ĉefverko de la andaluza nobel-premiito Juan Ramón Jiménez, finfine aperis tradukita en la internacian lingvon de Miguel Gutiérrez Adúriz kaj eldonita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Ĉu ĝi ne meritas esti en via ŝranko? KOMPRENEBLE JES!!!

Sur la paĝo 24-a aperas kiel Vi povos aĉeti ĉi tiun juvelon.

Universaligo de la Andaluza Lingvo-varianto

La origino de la andaluza kiel lingva varianto de la kastilia lingvo koincidis kun la kastilia ekspansio en la Atlantikan Oceanon, t.e. konkero de la Kanaria Insularo kaj la Amerika Kontinento. Ĉi tio helpis la universaligon de la andaluzaj lingvaj karakteroj kiuj ekde tiam disvolviĝis ne nur en Andaluzio sed ankaŭ en tiuj foraj regionoj. Post la kastilia konkero de la Kanaria Insularo abundis la rilatoj inter tiu arkipelago kaj Andaluzio, en ties konkero partoprenis multaj andaluzoj, krome la abunda komerco kaj la alveno de kolonoj, multaj el ili andaluzoj, en tiujn insulojn helpis la enirigon en Kanariojn de la lingvaj karakteroj propraj de Andaluzio, ekz. la prononco de la kastilia co kaj zo literoj kiel so litero tipa en multaj zonoj de Andaluzio kaj poste ankaŭ en la Kanaria Insularo.



Tamen estis multe pli grava la ekspansio de la kastilia lingvo kun andaluzaj karakteroj en Amerikon. Unuamomente la historiistoj de la kastilia lingvo opiniis, ke la plej grava influo al la hispana lingvo parolata en Ameriko venis de la indiĝenoj mem de tiuj teritorioj. Sed, la plej modernaj eseoj parolas pri la andaluza lingva varianto en Ameriko post la 15-a jarcento. Do, dum la unuaj jaroj de la konkero kaj koloniigo, la tiel nomata *antila periodo*, la lingva bazo de la kolonoj kaj konkerantoj devenis de la sudo de la Iberia Duoninsulo kaj, pro la fakto ke ili devis resti dum kelke da tempo en la insulo Hispaniolo (aktuala Dominika Respubliko plus Haitio) antaŭ arivi en la kontinenton, ĉiuj ili ekuzis la andaluzan lingvan varianton. Laŭ studoj de P. Boyd-Bowman, inter la jaroj 1493 kaj 1508 la 60% el la hispanaj kolonoj estis andaluzoj kaj poste, la du trionoj el la virinoj kiuj venis en Amerikon naskiĝis en Sevilo kaj ĉirkaŭaĵoj.

Do, dum la unuaj 30 jaroj de la kastilia konkero kaj koloniigo de Ameriko preskaŭ ĉiuj kastilianoj, eĉ tiuj ne naskiĝantaj en Andaluzio, ekuzis la andaluzan lingvan varianton kiujn ili ĉiutage aŭskultis unue en Hispaniolo kaj poste en la Nova Kontinento. Krome, la influo de la sevi-

la kaj poste kadiza komerco kun la kontinento neniam ĉesis. Do, la andaluza lingva varianto , ĉefe tiu de Sevilo kaj Kadizo, estis la normo por la kreolaj enloĝantoj de Ameriko.

Do, estas origine andaluzaj la amerikaj parol-manieroj kiel la uzo de la so-sono anstataŭ co kaj zo, ankaŭ la prononco de la kastil-lingva ll-dulitero kiel la ankaŭ kastilia *y*. Same rilate la aspiracion de la kastiliaj literoj *g* kaj *j*. Krome, tiu universaligo de la andaluza lingva varianto ne okazis nur rilate la fonetikon, ekzemple ankaŭ populariĝis la formala alparolo uzata en Andaluzio dum la 16-a jarcento kaj ankoraŭ uzata en Ameriko.

Tiu universaligo de la andaluza lingva varianto ankoraŭ okazas kaj ne nur rilate forajn landojn kiel tiuj de la amerika kontinento. Ĉar lingvaj karakteroj de la andaluza varianto estas nuntempe pli kaj pli uzataj en kastiliaj zonoj, ekzemple en Madrido mem. Tie jam eblas aŭskulti ofte la forigon de la litero *d* en la *ado-ada* finaĵoj, kio ja estas normala en Andaluzio.

Do, kvankam oni ne povas paroli specife pri *andaluza lingvo*, kvankam pri tio ekzistas diversaj opinioj pri kiuj oni parolos venont-numere, ja la andaluza lingva varianto posedas propran historion, universalan disvastigon kaj sendube gravegan rolon en la kastilia lingvo, kvankam multfoje maskita aŭ konfundita kun amerikaj lingvaj karakteroj.

La elektronikaj adresoj de la esperanto-movado en Andaluzio estas jenaj:

TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.org

- Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
  aeu @ esperantoandalucia.org
- Esperanto-Klubo Aksarkio
  axarquia @ esperantoandalucia.org
- Jaena Esperanto-Asocio
  jaen @ esperantoandalucia.org
- Esperanto el Kadizo
  cadiz @ esperantoandalucia.org
- Kordova Esperanto-Asocio
  cordoba @ esperantoandalucia.org
- Malaga Esperanto-Asocio “Marbordo de la Suno”
  malaga @ esperantoandalucia.org
- Onuba Esperanto-Asocio
  huelva @ esperantoandalucia.org

ĜENERALA ASEMBLEO DE ANDALUZIA ESPERANTO – UNUIĜO

En la urbo Malago la 27an de januaro 2009 je la 18:00 horoj, renkontiĝas ĉe la Lernejo "Al Andalus", la Ĝenerala Asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Ĉeestas 16 membroj de la asocio sub la prezidanteco de S-ro Angel Arquillos López, kiel sekretario agadas S-ro Julio Herrero Segura.

TAGORDO:

1) La Sekretario legas la protokolon de la ĝenerala asembleo okazita la 12-an de januaro 2008. La ĉeestantoj aprobas ĝin unuanime.

2) La kasisto prezentas la jar-bilancon de la jaro 2008:
Enspezoj: 363,20 eŭroj.
Elspezoj: 655,35 "

Fina Bilanco: - 292,15 eŭroj

3) La Prezidanto sciigas, ke la Andaluza Kongreso de Esperanto de la jaro 2009 okazos en Malago de la 2-a ĝis la 5-a de julio, samtempe al la okazigo de la 68-a Hispana Kongreso de Esperanto.

4) La Prezidanto proponas la aliĝon de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo al la projekto "2009 Zamenhofa Jaro", lanĉita de Hispana Esperanto-Federacio kaj de la Fondaĵo Esperanto. Do, dum la jaro 2009 okazos diversaj aktoj memore al la 150 datreveno de la Doktoro Zamenhof. La ĉeestantoj aprobas la proponon kaj oni petas al la Sekretario ellabori informon pri la projekto por posta sendado al ĉiuj membroj de la asocio, kaj tiel certigi kiel eble plej multenombran partoprenon.

5) Oni sciigas, ke dum la jaro 2008 okazis kursoj de la internacia lingvo en Sevilo, Malago, Jaeno kaj Velez-Malago. Ankaŭ oni organizis prelegojn kaj debatojn en Granado kaj Estepona. Rilate la ret-kursojn oni proponas rekomendi al ĉiuj interesitoj sekvi la interretan kurson *lernu.net.*

6) Proponoj

* La Kasisto proponas la plialtigon de la jara kotizo de la asocio. Oni aprobas ke la kotizo por la jaro 2009 estos 20 eŭroj.

* Laŭ informoj de José María Rodríguez, voĉdonanto pri propagando de la asocio kaj redaktoro de la revuo *Gazeto Andaluzia*, oficiala organo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, en la monato decembro aperis la numero 82-a de la revuo kun 40 paĝoj. La revuon oni dissendis al ĉiuj membroj de la asocio. La proksima numero devas aperi fine de la monato februaro 2009-a. La ĝenerala asembleo opinias, ke *Gazeto Andaluzia* estas interesa disvastigilo de la lingvo esperanto en Andaluzio kaj de nia lando ĉe la esperantistaro. La daŭra apero de ĉi tiu informilo estas certigita post la 82 numeroj jam publikigitaj ekde la jaro 1983. Oni petas al ĉiuj membroj de la asocio kunlabori kun la redaktoro pere de la sendado de artikoloj kaj aliaj kunlaboraĵoj.

* Laŭ sciigo de Pablo Foche, jaena membro de la asocio, dum la jaro 2008 estis necese ŝanĝi la adreson de la TTT-paĝo de la Esperanto-Movado en Andaluzio pro problemoj kun la antaŭa entrepreno kiu ebligis nian ĉeeston en Interreto. La aktuala adreso estas: www.esperantoandalucia.org . Oni petas al ĉiuj lokaj esperanto-asocioj kaj grupoj en Andaluzio kunlabori kun AEU en la redaktado de ĉi tiu paĝo pere de la sendado de ĉiaj informoj pri agadoj, kursoj, vivo de la asocioj, ktp.

* La Sekretario sciigas, ke la helpo kunordigita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo per volontaj mon-helpoj de la andaluzaj geesperantistoj por kunlabori kun la disvastigo de la lingvo esperanto en Afriko estis entute 500 eŭroj. Ĉi tiun monon oni donacos al la Instituto Zamenhof en Lomeo (Togo) kaj ĝi utilos por la konstruo de novaj lernoĉambroj en tiu gimnazio kaj por helpi la lernantaron.

Kaj je la 19:40 horo finiĝas la ĝenerala asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Subskribis:

La Sekretario


La Prezidanto

LA BRAJLA SKRIBADO KAJ LEGADO EN LA KOMPUTILOJ

Cristina Pérez Baeza

Sur la pasinta numero de nia revuo ni parolis pri kiamaniere ekinstrui al la infanoj kun limigita vid-kapabalo la uzadon de la brajla sistemo. Ĉi-numere ni pritraktos la temon pri la legado kaj skribado de mesaĝoj per brajla sistemo en la komputila mondo. Ni jam scias, ke la infano lernas legi kaj skribi per brajla sistemo, uzanta ilaron ĉefe pikilon kaj skribo-tabulon. Tamen komputil-periferiaĵoj speciale adaptitaj, tagon post tago, estas pli uzataj de personoj kun limigita vid-kapablo. Nuntempe ĉi tiu komputila sistemo estas eĉ pli uzata ol la kutima brajla sistema bazita sur pikilo kaj skribo-tabulo.

La komputila periferiaĵo utila por montri la informon per la brajla sistemo nomiĝas *brajla streko, (*en la hispana lingvo *barra braille* kaj en la angla lingvo *display braille).* Ĉi tiu periferiaĵo levas aŭ mallevas serion da plastaj punktetoj formantaj generajn signojn. La persono kun limigita vid-kapablo devas nur tuŝeti la brajlan strekon kaj la sinsekvaj generaj signoj tuŝos siajn fingrojn formantaj literojn. La plej oftaj el tiuj brajlaj strekoj havas 40 generajn signojn, do sufiĉan por prezenti al la uzanto rapidan informadon.




Brajla Streko

Tiel, la teksto aperanta sur la ekrano adaptiĝas al la brajla sistemo pere de speciala softvaro kaj la persono kun limigita vid-kapablo povas legi, se li sufiĉe bone regas la brajlan sistemon, kiun ajn tekston. Kompreneble ekzistas la funkcioj pri ripetado de teksto, rapidigo aŭ malrapidigo de la prezentado de la brajlaj literoj, ktp.


Okazas tute same se ni parolas pri presiloj. Ekzistas specialaj presiloj kapablaj anstataŭ presi literojn per inko, reliefigi la literojn sur la papero laŭ brajla sistemo. Nek la rapideco, nek la kvalito de la fina rezulto estas malsimila al tiuj presiloj uzantaj inkon por presi.

La plej modernan komputil-periferiaĵon taŭga por personoj kun limigita vid-kapablo, ĵus disvolvigis japana entrepreno. Temas pri normala komputilo kies ekrano estas formata de 3072 punktetoj kiuj adaptiĝas por aperigi mesaĝojn laŭ la brajla sistemo. Do, la uzanto povas legi la tekston ne nur ĉe la brajla streko sed multe pri precize sur la ekrano mem, kie ankaŭ povas aperi reliefigitaj grafikaĵoj, desegnaĵoj, ktp.



Brajla Presilo

Do, jam preterpasis la tempo kiam la personoj kun limigita vid-kapablo povis uzi komputiloin nur se ĉi tiui maŝinoi kapablis “paroli”, tio estas laŭtdiri per maŝin-voĉo tion kio aperis sur la ekrano, kompeneble oni ne uzis la brajlan sistemon. La brajla sistemo, do, estas tute taŭga ne nur por homa skribado sed ankaŭ por komputiloj.



Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Ni metas je la dispono de la membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jenajn verkojn eldonitaj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

PLATERO KAJ MI



Temas pri la plej fama verkaĵo de J.R. Jiménez, sinsekvo de poemoj en prozo, en kiuj la aŭtoro, kune kun lia azeno Platero, lirike priskribas la sunoplenan vilaĝon Moguer, ties homojn kaj ties pejzaĝon. Tradukis Miguel Gutiérrez Adúriz.

Prezo: 8 eŭroj


SANGA NUPTO



Unu el la plej konataj verkoj de Federico García Lorca. Unika sintezo de muziko, plastiko, scenografio, prozo kaj verso, konstituis la restarigon de la pura tragedio sur la hispanaj scenejoj. Ĝia intrigo okazas en vilaĝeto de la provinco Almerio, dum nupta ceremonio.
Tradukis: Miguel Fernández

Prezo: 6 eŭroj

APUD CENTJARA OLIV-ARBO
JUNTO A UN OLIVO CENTENARIO



Libro omaĝe al nia jaena samideano Alfonso Escamilla Roa (1912-2007), la plej veterana andaluza esperantisto. Ene de la libro aperas eseoj de diversaj aŭtoroj pri edukacio, esperanto, Pegalajar, Linares kaj Jaén. Ankaŭ aperas esperantista mem-biografio de S-ro. Escamilla kaj kelkaj fotografaĵoj.

Prezo: 5 eŭroj

Aĉetu ĉi tiujn librojn eldonitaj en esperanto en Andaluzio.
Kontaktu kun:
aeu @ esperantoandalucia.org
cordoba @ esperantoandalucia.org

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Alfonso Escamilla Roa

Kiam en la jaro 2005-a, okaze de la Andaluza Kongreso de Esperanto en Sevilo, nia samideano José Roldán kaj mi mem pripensis la eblon omaĝi al S-ro Alfonso Escamilla Roa, la plej veterana andaluza esperantisto, ni sciis, ke la tempo-paso estus kontraŭa faktoro por la plenumo de tiu ideo.

Tiutempe S-ro Escamilla jam estis 93-jaraĝa kaj kvankam lia bonfarteco estis kontentiga, ni ne povus prokrastigi la projekton prepari, verki kaj eldoni omaĝ-libron multe da tempo. Finfine, komence de la jaro 2007-a ni jam disponis pri la artikoloj, la fotografaĵoj kaj la mon-rimedoj por aperigi nian sopiratan libron.

Somere de tiu jaro, okaze de la Hispana kaj Andaluza Kongresoj de Esperanto, okazantaj en Palos de la Frontera (Onubo), oni prezentis la libron kaj rapide ni sendis kelkajn ekzemplerojn al li kaj al lia familio. Ni scias, ke li havis ĝin en siaj manoj, trafoliumis ĝin kaj supozeble ion legis el ĝi.

Feliĉege por ni, la omaĝo venis ĝustatempe, ĉar kutime tiaj omaĝoj okazas post la malapero de la omaĝinto, sed ĉi-foje ne! S-ro Alfonso Escamilla Roa povis vidi, supozeble ankaŭ tralegi la cent paĝojn de libro. La titolo estis jam deklaro: *Apud Centjara Olivarbo.* S-ro Escamilla estis tiu centjara olivarbo, ĉar jaena kaj ĉar preskaŭ cent-jaraĝa.

La kunlaborintoj en la verkado de la omaĝa libro verkis artikolojn pri temoj rilataj al Alfonso Escamilla, t.e.: la Edukado, Jaeno, Linares, Pegalajar kaj kompreneble la internacia lingvo esperanto.



S-ro Alfonso Escamilla Roa sur la brusto jam verda stelo en la 30-jardeko.

La pripensita omaĝo ankaŭ konsistis en la livero de tabulo al S-ro Escamilla. Unuamomente oni decidis doni la tabulon al li, aŭ al kelka familiano, okaze de la Hispana kaj Andaluzaj Kongresoj de Esperanto okazantaj en Palos de la Frontera en 2007. Tamen li, jam 96-jaraĝa, ne povis ĉeesti, ankaŭ neniu familiano.

Domaĝe, S-ro Alfonso Escamilla Roa forpasis la 16an de oktobro 2007. Malgraŭ sia aĝo li kapablis uzi komputilojn kaj de tempo al tempo li kunlaboris en la disvastigo de esperanto, ĉefe en la redaktado de artikoloj. Lia tuta esperantista historio aperas en la libro omaĝe al li eldonita, kiun feliĉe li ricevis kelkajn monatojn ol sia forpaso.

Komence de la jaro 2008-a la Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, S-ro Angel Arquillos, vizitis la familianojn de S-ro Escamilla en Linares (Jaeno). Estis momento por kondolenci denove. La filino de S-ro Escamilla emocie parolis pri sia patro kaj ŝi dankis ĉiujn mesaĝojn ricevitaj de la tuta Andaluzio post lia forpaso.

Ankaŭ estis momento por doni al familiano la memor-tabulon kiun S-ro Alfonso Escamilla devis ricevi kelkajn monatojn antaŭe. Sed neniu omaĝo egalus al la simpla legado de la ĉapitro "Mi Vida Esperantista" kiun li mem verkis. Tie eblas legi ne nur pri a esperanto-vivo de samideano sed ankaŭ multaj el la kialoj pro kiuj heroa generacio dum la 30-a jardeko esperantiĝis.

José María Rodríguez Hernández



La Prezidanto de AEU, S-ro Angel Arquillos, donas memor-tabulon al Rosa Escamilla, filino de S-ro Alfonso Escamilla Roa (1912-2007).
Linares, la 21-an de januaro 2008

HISTORIA DE LOS MOVIMIENTOS SOCIALES: ORÍGENES Y MOTOR DEL ESPERANTISTMO


Antonio Fabián Jiménez

Según Umberto Eco, la búsqueda utópica de una lengua perfecta durante los siglos XVIII y XIX, generó unas consecuencias tan importantes como el desarrollo de la lógica simbólica, los lenguajes de computación, o la clasificación biológica.

El esperanto nace en ese clima de búsqueda e interés científico por las lenguas durante el siglo XIX con precedentes tan importantes como es el caso del Volapük. Sin embargo, hay algo en el esperanto que lo hace diferente, y es que bajo la base del esperanto nacerá un verdadero movimiento social e ideológico que dará soporte a la lengua y sin el que su éxito y desarrollo posterior no podría ser entendido: el *Homaranismo.*

El esperanto no hubiera podido nacer sin ese antecedente ideológico. Su autor, Ludoviko Zamenhof, publicó la primera gramática de su lengua internacional en 1887. Como judío polaco en el imperio zarista, observó una asociación muy clara entre los odios y discriminaciones de clase, de nacionalidad, de raza y de idioma. A diferencia de otros inventores de lenguas, como Leibniz, la inquietud de Zamenhof era menos intelectual que social.

Este hecho y no sus capacidades intrínsicamente lingüísticas en cualquier caso también admirables, marcarán la diferencia entre el esperanto y los otros cientos de proyectos de lenguas auxiliares e internacionales que florecieron en el siglo del Romanticismo.



L.L. Zamenhof
1859 - 1917

Un siglo después de su nacimiento y a tenor del número de personas que lo dominan al menos pasivamente, se estima en base a las suscripciones a las diversas revistas, los alumnos de cursos y los miembros de clubes y asociaciones, que su número de hablantes podría acercarse al de

los dos millones de hablantes en todo el mundo, un fenómeno social realmente sorprendente y digno de estudio si tenemos en cuenta la total carencia de apoyos oficiales, financieros o institucionales a favor del esperanto, y la multitud de prejuicios a los que se enfrenta día a día dicho idioma.

La literatura original en este idioma fue reconocida formalmente, cuando el LX Congreso Internacional del Pen Club aceptó como miembro pleno al Pen Club de Esperanto (*La Jornada*¸ 12 de septiembre de 1993). En tres ocasiones (la primera en 1954), la UNESCO ha emitido resoluciones donde recomienda el uso y difusión de la lengua internacional, habida cuenta de la coincidencia entre los ideales esperantistas y los fines de la propia UNESCO.



Pero qué ideal existe detrás del esperanto que lo diferenció claramente de otros proyectos de idiomas que jamás llegaron a ver la luz, de dónde procede esa conciencia de colectivo, de pertenencia a un grupo diferenciado con una identidad propia.


El esperanto supone el primer caso en la historia de la humanidad en la que una lengua creada *ex novo* sobre el papel, se alza con la capacidad de articular en torno a su seno a un colectivo que paulatinamente va adquiriendo y desarrollando una identidad, un sentimiento de grupo formado por personas de lenguas, culturas, religiones, ideologías, naciones y latitudes geográficas muy distintas, hasta el punto de ser identificado por el resto de la sociedad como un "grupo" diferenciado y en consecuencia como posible víctima de represión y persecuciones bajo los regímenes autoritarios más terribles como en el caso de Hitler en la Alemania nazi y de Stalin en la Unión Soviética.

La base del idioma, el soporte fundamental que explicó su puesta en marcha debemos buscarla en la llamada *"Interna Ideo"*, esa ideología ecléctica y de cierto carácter místico promovida por su creador y sin la que el esperanto no podría ser entendido. Ciertamente Zamenhof fue un adelantado a su tiempo al llegar a preconizar unos "*Estados Unidos de Europa"* que pudieran evitar una Segunda Guerra Mundial. Hoy podríamos

traducir esa "Interna Ideo" como una suerte de pacifismo o humanismo sincrético fundamentado sobre la ética humana más elemental y que llegaría a tener cierto cariz místico o espiritual común entre los esperantistas.

El famoso Tolkien, autor de *"El Señor de los Anillos"* y de lenguas tan hermosas como el *Quenya* opinó acerca de las lenguas internacionales como el esperanto, que no creía en su éxito no por sus potencialidades lingüísticas, sino por la carencia de una base social, cultural o ideológica sobre la que su eventual desarrollo pudiera sustentarse, y así fue en el caso de la mayoría de las lenguas construídas, pero no en el caso del esperanto, pues unido a la bandera del esperanto se hallaban los ideales de fraternidad, solidaridad, paz, tolerancia, respeto y entendimiento con respecto a toda la humanidad, en definitiva los ideales que antecedería a los Derechos Humanos de la actualidad.

HUMORO




Turismi en ... LUCENA

Lucena estas urbo situanta en la vojo inter Kordovo kaj Malago. Post la urbo Kordovo mem, Lucena estas la plej granda urbo en la kordova provinco kaj ĝi memorigas al ni vortojn kiel industrion, kulturon, progreson kaj riĉan historion, ĉefe jud-devenan.

Historio

Ekzistas homaj restaĵoj ĉe la tiel nomata "Groto de l'Anĝelo" pruvantaj, ke antaŭ 500 mil jaroj jam ekzistis homoj en ĉi tiu zono. Sed la unua sufiĉe granda homa setlejo proksime al la nuntempa urbo Lucena estas la ibera urbo Morana, tri mil jaroj a.K. La unuan dokumenton kie oni parolas pri la urbo estas eble trovi en la 9-a jarcento, kiam oni parolas pri atakoj de la araba Umar ben Hafsun kontraŭ la kastelojn de *Qabra* (la nuntempa Cabra) kaj *al-Yussana* (Lucena), kies enloĝantoj estis ĉefe judoj.



Blazono de Lucena


En la jaro 1010 la urbo Lucena apartenis al la Granada reĝo. La enloĝantoj estis ĉefe jud-devenaj kaj ili devis aĉeti sian propran liberecon al la almoravida reĝo Jusuf ben Jashufin. La tiutempa urbo *Eliossana* bonvenigis tiam judojn ankaŭ venintaj de Kordovo kaj Granado.

En Lucena naskiĝis grandaj figuroj de la juda kulturo en Al-Andalus, kiel Jehuda Halevi, ibn Gabiroj kaj tiuj de la familia ibn Ezra. Ĝis la invado de Al-Andalus fare de la nord-afrikaj almohadoj en la jaro 1148 la judaj rabenoj de Lucena estis la plej gravaj ĉe la judaj komunumoj de Okcidenta Eŭropo. Sed okaze de tiu invado la judoj devis elmigri en la nordajn kristanajn reĝlandojn. Ili iris en Toledon kaj en la sudfrancan urbon Narbonon. En la jaro 1240 la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon kaj ĝi fariĝis unu el la plej gravaj punktoj en la landlimo ĉe la granada araba reĝlando.

La kresko de la enloĝantaro tiuepoke estis okulfrapa. En la jaro 1495 loĝis en la urbo 1.500 personoj, sed en 1550 jam estis 15.000. Ekde tiam, kaj dum la postaj jarcentoj, Lucena estis ĉefe agrikultura urbo kie abundis la oliv-arboj kaj la produktado de vino, ne forgesu, ke Lucena estas tre proksima al la mond-fama kordova vin-regiono *Moriles-Montilla*. Meze de la pasinta jarcento stariĝis en la urbo

granda nombro da industrioj, ĉefe rilataj al la ellaborado de mebloj kaj industria malvarmigo, pro tio dum multaj jaroj la urbon oni konsideris kiel unu el la plej produktivaj zonoj de Andaluzio kie la senlaboreco tute ne ekzistis.

Hodiaŭ Lucena estas urbo samtempe industria kaj agrikultura, ĝi estas la dua plej granda urbo en la kordova provinco kaj ĝia situo, meze de la aŭtovojo inter Malago kaj Kordovo donas al la urbo sufiĉe gravan turisman perspektivon.



Turo de la Kastelo


Monumentoj

* *Plaza del Coso:* temas pri la plej antikva placo en la urbo. Ĉe ĝi okazis mezepoke festoj, merkatoj, taŭroludoj kaj eĉ publikaj ekzekutoj. Ĝi estis parto de la antikva kastelo.


* *Kastelo del Moral:* ĝi estis la malliberejo de la granada araba reĝo Boabdil. Unue temis pri kastelo kun kvar grandaj turoj starigitaj ĉe la anguloj kaj ĉirkaŭanta murego. Nuntempe nur estas videblaj du el tiuj turoj kaj kelkaj partoj de la murego. Post la definitiva konkero de la Granada Reĝlando, la kastelo ekapartenis al nobela familia reganta la urbon, unue la Sinjoroj de Lucena kaj poste la Markizoj de Comares.

* *Domo de la Familia Polo de Lara:* ĉe la strato *Quintana* troviĝas unu el la plej belaj domoj de Lucena. Ĝi apartenis al la nobela familia *Polo de Lara*. Sur la fasado videblas ruĝaj brikoj kaj blankaj nudaj muroj. Oni starigis ĝin fine de la 18-a jarcento.

* *Palaco de la Grafoj Santa Ana:* temas pri monumenta baroka palaco, sendube la plej bela en Lucena. Oni ekkonstruis ĝin en la jaro 1730. Du belaj fasadoj plenaj je grandaj fenestroj, balkonoj kaj belegaj marmoraj kolonoj plenbeligas ĉi tiun palacon kiu baldaŭ estos la turisma oficejo de la urbo.



* *Preĝejo de la Virgulino Araceli:* ĝi situiĝas sur la plej alta pinto de la montaro *Aras*, je 6 kmoj de la urbo. La vidaĵo el tie estas nekredeble bela, eblas vidi kvin andaluzajn provincojn kaj pli ol 30 vilaĝojn. Stariĝis komence de la 17-a jarcento kaj ĝi estas stile baroka. La Virgulino *Araceli* (el la latina *aras coeli* : ĉiela altaro) estas la nomo de la Virgulino laŭdata en la urbo Lucena.



Sur la pinto de la Monto *Aras* stariĝas la preĝejo de la Virgulino *Araceli* en Lucena.

* *Preĝejo Sankta Mateo:* konsiderata kiel la lucena katedralo, oni ekkonstruis ĝin en la jaro 1498. Kvankam el la arta vidpunkto aperas restaĵoj de la fina gotika periodo, la konstruo estas esence renasenca. La ĉefa altaro estas belega arta ekzemplo de la hispana *manierismo.* Sur ĝi aperas bildoj de la vivo de Jezuo Kristo kaj scenoj de la Biblio.

Festoj

* *Fiestas Aracelitanas*¸ festoj honore al la Virgulino Araceli estas la plej gravaj festoj en Lucena. Okazas komence de la monato majo. La Virgulino venas en Lucena-n el la preĝejo situanta sur la pinto de la monto *Aras.*


* *Reĝa Foiro* tipa andaluza foiro, okazas de la 6-a ĝis la 10-a de septembro.

* *Pasko:* kiel okazas tra la tuta Andaluzio ankaŭ en Lucena dumpaske okazas religiaj paradoj memore al la Pasiono de Kristo kaj honore al la Virgulino Maria.

* *La mortigo de Judaso: Jauja* estas vilaĝeto apude al Lucena kaj apartenanta al ĉi tiu urbo. Dumpaske okazas festo nomita *la mortigo de Judaso.* Okaze de ĉi tiu festo oni konstruas pupon el pajilo kiu poste estas pendumita sur balkono de unu el la domoj de la ĉefa strato. La enloĝantoj de la vilaĝeto *Jauja*, kun la aspekto de romiaj soldatoj, pafas al la pupo.



José María Hinojosa, konata kiel *El Tempranillo.* Fama bandito de la 19-a jarcento kiu naskiĝis tuj apud Lucena.



La giganta seĝo de Lucena aperas sur la Rekord-Libro *Guiness*, kiel la plej giganta seĝo en la mondo. Ni memoru, ke la mebl-industrio estas unu el la ĉefaj riĉecoj de Lucena. Do, en la jaro 2001 mebl-fabrikantoj de la urbo decidis starigi grandegan seĝon por omaĝi ĉi tian industrion. La seĝo mezuras 26 metrojn alte, pli malpli kiel ok-etaĝa konstruaĵo, kaj kun la lignaĵo uzata por ĝia konstruo estus eble fabriki preskaŭ 10.000 "normalajn" seĝojn.

Gastronomio

Lucena havas riĉan gastronomion kie abundas la kuiraĵojn kun forta gusto tre spiciita. La oleo kaj la olivoj aperas en preskaŭ ĉiuj manĝaĵoj, ĉar Lucena estas zono kie abundas la produktadon de oleo. Sufiĉe konataj estas la lucenaj *bolos*, la oranĝoj kun moruo kie aperas intermiksiĝo de fortaj gustoj. La vino ankaŭ estas gravega en Lucena, memoru ke tuj apude troviĝas urboj kiel Montilla kaj Moriles, mond-konataj pro la kvalito de la vinoj.

Placo de la Urbodomo
en Lucena



Venont-numere


TURISMI en....

SAN FERNANDO
(Kadizo)

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La malbenata monaĥejo en Carmona

Proksime al la urbo Carmona en la provinco Sevilo troviĝas la ruinoj de monaĥejo kiu, laŭdire, temas pri malbenata loko. Ĝis la jaro 1957 loĝis tie komunumo da karmelaj monaĥoj, tamen tiujare la religia ordeno rapide kaj preskaŭ sekrete vendis la monaĥejon al riĉa familio en Madrido.



Ruinoj de la malbenata monaĥejo en Carmona

Laŭ oni diris tiu rapida vendo reale estis venĝo de altranga membro de la karmela ordeno kiu, kelkajn jarojn antaŭe, ĵuris forvendi la lokon kie li suferis dum siaj unuaj jaroj kiel monaĥo. Oni diris, ke post la hispana milito 1936-1939 la monaĥoj suferis malsaton kaj ili eĉ devis rabi manĝaĵojn en la ĉirkaŭantaj kampardomoj. Oni parolis ankaŭ pri samseksemaj agadoj en la monaĥejo.

Eĉ oni parolis pri strangaj sonoj aŭskulteblaj inter tiuj grandaj muregoj. La plej maljunaj parolis tiam pri legendo kiu ĉiam ĉirkaŭvualis la monaĥejon kvankam ĉiuj asertis, ke temis nur pri legendo. Okazis dum mateno de la monato novembro de la jaro 1680 ke monaĥo vekiĝis post aŭskulti strangan bruon. Li vidis, ke la ceteraj monaĥoj ne troviĝis ĉe siaj ĉeloj, do li decidis iri en la lokon el kiel la bruego venis. Temis pri kelo kie oni gardis la manĝaĵojn, ĉefe la viandon.

Kiam li eniris en la kelon terura vidaĵo subite aperis antaŭ li. Sub la plafono aperis pendumitaj la korpoj de ĉiuj monaĥoj kaj sub ili dancis centoj da malgrandaj entoj manĝantaj ties korpojn. Tiuj diablaj entoj vidis la monaĥon kaj rapide ili kuniĝis laŭ ununura granda ento multe pli granda kaj diablo-forma kiu ekkriis: *Mi lasis vin viva, por ke vi proklamu mia veno en la mondon. Foriru kaj diskonigu ke Satano jam estas ĉi tie.*

La monaĥo rapide forkuris en la vilaĝon kie li sciigis al ĉiuj pri tio kion li vidis kaj sentis, sed kompreneble neniu kredis ĝin. La gardistoj eĉ arestis lin. Tamen multaj vilaĝanoj iris en la monaĥejon kaj tie sur la plej alta turo stariĝis tiu diablo ekkrianta: *Mi detruos ĉion!* Tiam tertremo detruis la monaĥejon. La enloĝantoj decidis semi per salo la tutan zonon. Ili ankaŭ celebris mesojn dum du jaroj kaj ĉi tiel pentopagi pro siaj pekoj.

Ĉu reala okazintaĵo? Kompreneble temas pri legendo, ja pri terura legendo. La ruinoj ankoraŭ videblas sur la vojo inter Carmona kaj El Viso del Alcor, kaj eĉ estas eble vidi ankoraŭ la hokilojn kie supozeble aperis pendumitaj ĉiuj monaĥoj escepte unu.

ÆSF

ANDALUZA ESPERANTOLOGIA SEMAJNFINO

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj Kultura Centro Esperantista (Svislando) organizas la Unuan Andaluzan Esperantologian Semajnfinon, en Malago, 14-an / 15-an de novembro 2009. Ĝi estas malfermita al ĉiu membro de AEU kaj al ĉiu persono kiu havas la esperantan civitanecon (je la dato 10-a de aŭgusto 2009).

Ĉi tiu unua AESF konkludas la perkorespondan preparon de pluraj personoj cele trapasi superajn nivelojn laŭ la Lingvo Testa Sistema de la Esperanta Civito. Specife ĝi kompletigas la trejnadon por B2 / C1 niveloj. Eblas ankaŭ havi paralelan studgrupon kiu preparos por A2-diplomo.

Entute ĝis nun anoncis sin jam deko da personoj, preskaŭ ĉiuj el Andaluzio.

Pri la aranĝo respondecas Julio Herrero surloke kaj Giorgio Silfer didaktike.

FLAMENKO

El Cabrero



José Domínguez Muñoz
EL CABRERO

José Domínguez Muñoz naskiĝis en la jaro 1944 en Aznalcollar, vilaĝo en la provinco Sevilo. Li estis filo kaj nepo de kapro-paŝtistoj kaj li mem, apenaŭ ses-jaraĝa, forlasis la lernejon kaj ekhelpis sian patron en la paŝtado de kaproj, jen la origino de la krom-nomo de José Domínguez *El Cabrero* (la kapro-paŝtisto).

El sia patrino li aŭskultis siajn unuajn flamenkajn kantaĵojn, ĉefe tiujn de Manolo Caracol. Jam 10-jaraĝa li partoprenas en flamenkaj babil-rondoj. Unuamomente lia patro ne ŝatis tiujn flamenkajn inklinojn de la knabo ĉar, supozeble, li devis daŭrigi la taskojn de la familio en la kamparo. Do, li daŭre laboris kiel kapro-paŝtisto, kvankam ofte li ĉeestis flamenkajn festivalojn, kie li aŭdis grandajn kantistojn, kiel Juan Talega aŭ Paco Toronjo. Okaze de la Sevila Foiro, Paco Toronjo, kiu poste estus unu el siaj plej grandaj amikoj, invitis lin kanti apud li.

Dum la deviga milit-servo li suferis siajn unuajn problemojn pro sia amo al la flamenka kantado, ĉar li ne dubis kanti antaŭ la soldataro, anstataŭ plenumi la soldat-servajn debojn. Do, li pasis multajn tagojn en la soldat-malliberejo. Post la milit-servo li revenis en la kamparon kie li laboris kiel paŝtisto, tamen pli kaj pli ofte li vizitis lokojn en Sevilo kie eblis aŭskulti flamenkajn kantaĵojn. Unuafoje li kantis akompanita de gitaristo, en unu el tiuj lokoj li konis al Pepe Carrasco, kiu proponis al li surbendigi diskon por grava muzik-entrepreno. Tamen li rifuzis la ideon ĉar li ne deziris forlasi sian kamparan laboron.

En la jaro 1971 li decidis vendi siajn tutajn apartenaĵojn, t.e. kvin

kaproj kaj li aĉetis trajn-bileton por iri en Madridon ĉar li deziris triumfi kiel flamenka kantisto. Tamen al li tute ne plaĉis la ĉefurba etoso kaj li revenis en Sevilon, tie tute senmone li eĉ dormis surstrate.

Hazarde li renkontiĝis kun membro de la teatra grupo *"La Cuadra"*, la grupestro, Salvador Távora, invitis lin partopreni en la spektaklo *"Quejío"*. Dank'al tio li vojaĝis tra la tuta Hispanio kaj eĉ eksterlanden: Francio, Italio, Svisio... Sed unu jaron poste li denove revenis en la kamparon ĉar al li ne plaĉis tiu teatra vivo. En la jaro 1973 kun la atingita mono kaj kun sia kunulino Elena, kiun li konis en Svisio, li aĉetis kelkajn kaprinojn kaj ili loĝis malriĉe en sia vilaĝo.

En la jaro 1974 li partoprenis en la Nacia Konkurso de Flamenka Arto okazanta en Kordovo kaj, malgraŭ la fakto, ke li atingis neniun premion oni proponis al li denove surbendigi diskon. Ĉi-foje li akceptis. Tiel, en la jaro 1975 aperis *"Así canta El Cabrero"* kun la gitar-akompano de José Cala *el Poeta*. Aliaj diskoj aperus en venontaj jaroj... *"A esta tierra que es mi mare"* en 1976; *"Tierras Duras"* en 1977; *"A paso lento"* en 1978... Krome li partoprenis en la plej gravaj flamenkaj festivaloj kie li ricevis ĉiam tondrajn aplaŭdadojn de la ĉeestanta publiko.

Tiuepoke li komencis ankaŭ kampanjon por liberigi la transiron tra la kampar-vojoj, preskaŭ ĉiam fermitaj de la riĉaj ter-posedantoj.

En la jaro 1977 li denove partoprenis en la Nacia Konkurso de Flamenka Arto, kaj kvankam li ricevis la plej tondran aplaŭdadon de la publiko en la branĉo *Soleás*, la juĝistaro decidis aljuĝi la premion nek al li nek al alia kantisto. Laŭdire al la juĝistaro ne plaĉis la malpura aspekto de la kantisto kiu estis sur la scenejo kun la botoj kot-malpurigitaj. Tiu-nokte aŭdiĝis en la Granda Teatro de Kordovo, la urbo kie okazis la Konkurso, la protesto de la publiko. Kelkajn jarojn poste li atingis en tiu sama konkurso du premiojn, unu en la branĉo *Soleás* kaj la alia en la kantado de *Malagueñas.*

Kelkajn tagojn post tiu granda sukceso *El Cabrero* suferis incidenton kun gardisto de min-entrepreno, kiu malpermesis al li trapasi kamparan vojon tuj apud la minejo. Okazis lukto kiu finiĝis per denunco ĉe la juĝejo. La prokuroro petis kondamnon al 4-jara malliberigo. Finfine Tribunalo en la urbo Sevilo absolvis lin. Sed la juĝ-problemoj daŭriĝis, tiel, okaze de koncerto en Kordovo oni akuzis lin blasfemi ĉe la scenejo, oni petis al li kondamnon al 4-mona-

ta malliberigo kaj mon-puno. En la jaro 1982 li devis eniri en la malliberejon kie li restis dum unu monato, finfine la hispana registaro mem forpardonis lin.

Ekde la 80-a jardeko la tekstoj de *El Cabrero* estas socie kontestemaj, kvankam ĉiam vestitaj en tradiciaj kant-stiloj. Kelkaj flamenkaj-spertuloj diskreditas sian reputacion kiel kantisto pro tiu socia kaj politika signifo, sed male oni invitas lin al preskaŭ ĉiuj flamenkaj festivaloj kaj li eĉ estas agnoskita kiel socia fenomeno. En la jaro 1988 la reĝisorino Béatrice Soulé produktis filmon pri li, la produktaĵon oni dissendis en televidoj de preskaŭ ĉiuj landoj...escepte en Hispanio.

Dum tiu jaroj aperis novaj diskoj: *"A mi me llaman Cabrero", "Dale Alas", "Luz de Luna", "Le sigo cantando a Huelva", "Que corra de boca en boca", "Encina y Cobre"...* Entute ĝis nun aperis 19 diskoj, 17 el ili pri flamenko kaj la ceteraj du pri tanga muziko, ĉar lŭ li mem konfesis, Carlos Gardel estas lia preferata kantisto. Li ankaŭ kunlaboris kun rok-ensembloj kiel *Reincidentes* kaj *Marea.*

Kvankam *El Cabrero* ricevis akrajn kritikojn ekde sia komenco kiel flamenka kantisto li ankaŭ ricevis la plej fortajn kaj sincerajn apogojn. Eble li estis la unua flamenka kantisto kiu kapablis vesti la tradician flamenkan stilon en la plej modernaj kaj socie avangardaj temoj ĝisdatigante muzik-stilon kiu ekde la komenco naskiĝis por utili kiel laŭtparolilo de la plej malriĉuloj. Do, *El Cabrero,* komprenis perfekte la sencon de la flamenkan arton.

Ne estas mi kiel besto
silentigita de furaĝo,
ne estas mi tiu besto
ĉar ene de mi troviĝas
tiu malkontento
nutriganta mian penson.

Pri sia profundo vantas la maro
kaj la tempo pri sia saĝeco,
pri profundo vantas la maro
pri sia povo, la vento
la tero pri sia grandeco
kaj la homo mi ne scias pri kio.

Oni nomas min nigra ŝafo
ekde ĉiam en mia brutaro
oni nomas min nigra ŝafo
ĉar plenfekan kuŝejon
kun aliaj mi ne dividas
kiam puregas la vana tero.

Mia patrujo la libereco estas
l'Universo mia dio
mia patrujo la libereco estas
mia standardo, la racio
mia vojo, la vero
jen mia tuta penso.

Pri preskaŭ ĉio mi jam kantis
tio pensigas min
pri preskaŭ ĉio mi jam kantis
kaj jen la vico ekkanti
pri io neniam ekzistanta:
la Kolombo de la Pac'.

EL CABRERO

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Sekretario: Julio Herrero Segura
Kasistino: María Dolores Torres Mateos
Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.org


Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

juan ramón jiménez:

platero kaj mi



hispana literaturo